

Memorigajn bildojn de la somera ekumena kongreso en Strasbourg.

Fotis Karl Heinz Schaeffer.

Stefan Lepping klarigas sian koncerton



Monastejo Sankta Odilia



La pastro ĉiĉeronas sian preĝejon



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420311241406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝironto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Dialogo apud la puto	99
La dua prediko dum UK en Lille	102
La eternulo, nia provizanto	105
Invito la KELI-kongreso 2016	109
Trnava – vizito dum kongreso	111
Listo de aliĝantoj	111
Renkontiĝo en Jerusalemo	112
Invito al Bibliaj Tagoj 2016	115
Vizito ĉe Britta Rehm	115
Nekonata historio pri Nagasaki	116
Informetoj	118
Laŭde, laŭte kantu ni al Di'	120

Redaktoraj vortoj

Jam la aŭtuno venis, la someran tempon ni ŝanĝis al la normala/vintra tempo kio malheligas la vesperojn. La emo resti hejme kaj interne fortiĝis. Eble estas bona tempo por legi librojn aŭ studi iun interesan temon. Tiu legado povus rezulti en artikoleto en Dia Regno, kial ne? Aŭ en prelego en iu esperanta renkontiĝo aŭ artikoleto en Vikipedio. Mi ofte uzas Vikipedion por trovi materialon aŭ kontroli esperimojn en aliaj lingvoj. Vere utila ilo sed ni devas zorgi pri pli da artikoloj kaj informoj. Ĝi ne kreskas per si mem.

Ĉi-numere vi trovas ekzemplon de ĉiu tipo. Vi povas ekz. legi informeton pri moluskoj, iama prelego en esperanta rondo. Aŭ eltiro de Vikipedio en formo de apuda aldono al artikolo.

Do kaptu la eblecon ĝui la hejman varmon, legu kaj verku. Ni bezonas Dia Regno bezonas viajn verkojn.

Mi ankaŭ volas instigi vin, ke vi vizitu la paĝaron de Kristanaj Fontoj. Uzu ĝiajn trezorojn.

Dialogo apud la puto

Ekumena Esperanto-Kongreso
Strasburgo, 2015

Philippe COUSSON, FR

Kiam ni decidis preni kiel temon de la kongreso la temon de la ĉijara Preĝsemajno por unueco de la kristanoj, ni ankaŭ aldonis la subtemon “la malsameco pliriĉigas nin”.

Ni jam komencis pritrakti la temojn.

Mi volas doni superrigardon konservante en la fonon la bildon de Jesuo ĉe la puto kun la Samarianino.

Ni ĉiuj konas la rakonton. Ni povas preskaŭ bildigi ĝin laŭ propra imago, laŭ bildoj viditaj en la infanaĝo, laŭ bildoj viditaj en iu kino-filmo. Mi ne volas forpreni de vi tiun ĉi bildon.

Laciĝinta, Jesuo sidiĝis apud tiu puto ekstere de iu Samaria vilaĝo. La disĉiploj iris por aĉeti manĝaĵojn.



Philippe Cousson dum la diservo dum ekumena kongreso en Strasbourg

Plej malprobable en tiu meztaga horo iu virino venas al la puto por ĉerpi akvon. Oni tamen ekkonos ke ŝi ne nur akvon serĉadis. Estis en ŝi soifo alispeca, spirita soifo.

Samario kaj Judujo estas najbaraj regionoj, sed la enloĝantoj pro historiaj kaj religiaj kaŭzoj konsideras unu la aliajn kiel fremdulojn. Tiun limon aŭdace Jesuo transpasas.

Ofte akvo fariĝis limo inter du popoloj. Facile oni povas utiligi riveron kiel limon. Eĉ tute apude, laŭ kelkaj centoj da kilometroj la rivero Rejno estas landlimo inter Francio kaj Germanio. Sed same, akvo povas fariĝi ligilo inter la homoj. Tial oni konstruas pontojn, oni instalas pramojn. Jesuo tie konstruis ponton super tiu limo, super tiu puto.

Mi ĵus diris ke la virino venis tien pro soifo, pro spirita soifo ne agnoskata. Kaj tion perceptis Jesuo. Sed la virino ne tuj komprenis ke Jesuo parolis pri alia soifo, pri alia akvo. Tamen ŝia vivo estis poste komplete ŝanĝita, kaj ankaŭ tiu de aliaj vilaĝanoj pro ŝia atesto kaj pro rekta kontakto kun Jesuo.

Vi certe memoras tiun versiklon el la 42a psalmo: “*Kiel cervo sopiranta al fluanta akvo, tiel mia animo sopiras al vi, ho Dio. Mia animo soifas Dion*”. Jen la vera soifo. Multaj aferoj, en nia

mondo, nuntempe sed ankaŭ en la daŭro de la tempoj, multaj aferoj povas aspekti kiel sensoifigantaj. Sed ili ne kapablas sensoifigi la homon.

Ni ne forgesu la diron de Jesuo en la evangelio laŭ Johano: “*Se iu soifas, tiu venu al mi kaj trinku.*”

Strange, en la komenco de la dialogo, Jesuo inversis la rilaton, petante pri akvo: “*Donu al mi trinki.*”

Sed la daŭro de la konversacio pruvis ke ne la virino kapablas provizi vivakvon, sed nur Jesuo.

Apud tiu fundamenta dialogo instaligis alia dialogo ne neglektebla. Tiu pri la ĝusta religio. Kie oni devas adori. Kio estas la vera religio.

Jesuo respondis, ne respondante. La nek nek de lia respondo resendas al ambaŭ sistemoj, la tiama jerusalema templa sistemo kaj la samaria sistemo. Jesuo fakte kondamas neniun el ili. Li preterpasas ilin. Li iras pli funden en la signifon.

“*La veraj adorantoj adoras la Patron en spirito kaj vero.*” Jen la radiko de la rilato al Dio. Ĝi ne troviĝas en loko, en rito. Jesuo ĉi tie volas ne neglekti sed preterpasi tion, kio povas aperi kiel limo.

Kiam ni legas la komencon de la unua epistolo al la Korintanoj, ni povas vidi ke sufiĉe frue, eĉ ene de loka komunumo de kredantoj, aperis limoj. Ĉi tie ne temis pri loko aŭ rito, aŭ eble ni ne scias, sed temis pri homoj, pri tiuj homoj kiuj fariĝis modeloj, herooj, sanktuloj. Mi estas de Paŭlo, de Apolos, de Petro, de Kristo eĉ.

Ĉi tion Paŭlo tuj volas kontraŭi. Ne ekzistas eklezio de Paŭlo, nek de Apolos, nek de Petro, sed nur de Kristo.

Kristo ne estas dividita. Ni ĉiuj vivas el unu sola akvo, kaj tiu estas Jesuo mem.

*Kristo ne estas dividita.
Ni ĉiuj vivas el unu sola akvo,
kaj tiu estas Jesuo mem.*

Ni estas malsamaj, ni devas koncedi. Sed kio vivigas nin, tio estas la vivakvo, tio estas Jesuo. Ni ne dispecigu Jesuon laŭ niaj akvoj, niaj limigantaj akvoj. Ni serĉu kie li estas, kio li estas, kiu li estas.

La ekumena dialogo havas tiun naturon ke Jesuo estas la sama por ĉiuj kristanoj. Ni ĉion grace ricevis de Dio tra Jesuo Kristo. Ni fakte estas unu, sed ne kapablas vidi tion, vivi tion, ĉar ni tiel insistas en lokoj, ritoj, homoj, dogmoj. Ke ni transiru al la adoro en spirito kaj vero, al dialogo en spirito kaj vero, al la fonto de la vera akvo. Tiam el ni ŝprucos ankaŭ tiu akvo al la mondo ĉirkaŭ ni. Tiam la mondo ekkonos kie troviĝas la vera vivakvo. Se homoj povas diri ke ili kredas pro nia atesto, poste ili eĉ povos renkonti mem Jesuon kaj diros ke ne nia atesto efikis, sed la renkonto kun la vera fluanta akvo, kun Jesuo Kristo.

Kiel Jesuo ne kondamnis la lokojn kaj ritojn de la tiamaj Judoj aŭ Samarianoj, tiel ni ankaŭ ne kondamnu niajn lokojn kaj ritojn, sed pliriĉigu per la kompreno de la fido de la aliaj kristanoj, prenante por ni kiam utilas tiun postfluron el la akvo kiu ŝprucas el la kredanto, el la alia kredanto, el iu ajn kiu vivas per kaj pro la graco de Dio en Jesuo Kristo.

La interreligia dialogo situigas en tute alia kadro. Kiam iu parolas pri alia religio, al anoj de alia religio, tiu nepre bezonas kompreni kiel pensas, kredas, agas, reagas la alia homo. Se ne, miskomprenoj tuj venas, kaj eble ankaŭ timoj kaj malamoj. La unua kialo, eble la ĉefa, de la interreligia dialogo estas la emo kaj neceso por paca kunvivado.

*pliriĉiĝu per la kompreno
de la fido de la aliaj kristanoj*

Tiu dialogo postulas kelkajn kondiĉojn. Paralelojn oni tamen povas starigi kun la ĉeputa dialogo. Ŝajne ili ambaŭ konis la sistemon unu de la alia, kaj ankaŭ la propran.

Tio estas la unua kondiĉo: bone koni sian propran religian fidon kaj sistemon. Tiel la dialogo estas vera kaj sincera kaj cetera ne trompema.

Alia kondiĉo estas sincera scivolemo pri la kredo de la alia, pri la alia mem. Tamen laŭ la mezuro de la bonvolo de la alia, de ties akcepto montri sin.

Tiu dialogo entenas en si mem kelkajn stumblilojn, kelkajn danĝerojn.

Se dum tiu dialogo oni konstruas al

si sistemon el brikoj de diversaj fontoj, tiam la alia ne plu scias al kiu li parolas. Sinkretismo, kiam ĝi ekzistas aŭ formiĝas, ne povas partopreni en interreligia dialogo, krom se ĝi klare anoncas sin tia.

La alia danĝero en la interreligia dialogo estas la ekskludo. Oni ne povas dialogi kun tiu, al kiu oni ne agnoskas la rajton pensi alimaniere. Oni ne povas dialogi kun tiu, al kiu oni ne agnoskas ties spacon en la socio.

Nuntempe aperis nova praktika difino de toleremo, kiu povas konduki al netoleremo, nome, anstataŭ la tradicia difino de toleremo kiel respekto al la vidpunkto de la alia, la nova difino postulas la nepran validecon de ĉiu vidpunkto kaj devigas vin enigi en vian sistemon tiun postulon.

Ni, kristanoj, dialogas inter ni, kun homoj de aliaj mondperceptoj. Ni neniam forgesu kiel Jesuo kondukis tiun dialogon apud la puto. Li konigis la virinon al ŝi mem, anstataŭ senmova akvo el puto li provizis al ŝi vivakvon, kiu estas li mem. Li kondamnis nek la virinon, nek ŝian fidon aŭ riton. Tamen ŝi ricevis ion novan.

Ĉu tio estas “protestanta akvo”? Eble jes, eble ne?



Preĝo dum la dua kongresa tago (el la kongreslibro)

Favorkora Dio,

Ofte niaj Eklezioj laste elektas la konkureman logikon.

Pardonu al ni, nia orgojlo estas peko.

Ni estas lacaj pro tiu bezono esti la unuaj.

Lasu nin ripozi ĉe la puto.

Malsoifigu nin per la akvo de unueco kiu fluas el nia komuna preĝo.

Via Spirito, kiu ŝvebis super la akvo de la kaoso, donu al ni la unuecon.

Amen.

La dua prediko dum UK en Lille 2015

Gerrit BERVELING, NL

Karaj fratinoj kaj fratoj, ĉi tiuj versoj de la profeta libro de Jesaja estas iom nekutima kunigaĵo de frazoj, pri kiuj la fakuloj supozas ke origine ili ne apartenis kune. Do ankaŭ ni ne ĝenu nin, legi la erojn iom dise unujn de la aliaj: ekparolas al ni – per la voĉo de la profeto – Dio JHVH – la SINJORO: li nomas nin homoj, kiuj postkuras la veron – kiuj serĉas ĝin, kaj serĉas lin.

Do provu ni pravigi Dion en tiu optimisma lia opinio pri ni: ni ESTU DO serĉantoj de la vero, ni vere serĉu DION! – simple en nia reala ĉiutaga vivo. Dio alvokas nin, ke ni rigardu Lin, la rokon el kiu ni estas hakitaj. Tio estas metaforo, kiun eble ni komprenu tiel, ke ni homoj ja ne estas mola substanco – ni estas el roko, do malmolaj, duraj.



Gerrit Berveling dum la diservo dum ekumena kongreso en Strasbourg

Aŭskultu Min, vi, kiuj postkuras la veron, kiuj serĉas la Eternulon: rigardu la rokon, el kiu vi estas elhakitaj, kaj en la profundon de la kavo, el kiu vi estas elfositaj. 2 Rigardu Abrahamon, vian patron, kaj Saran, vian naskintinon; ĉar Mi alvokis lin, kiam li estis sola, kaj Mi benis lin kaj multigis lin. 3 Ĉar la Eternulo konsolos Cionon, konsolos ĉiujn ĝiajn ruinojn, kaj ĝian dezerton Li faros kiel Eden, kaj ĝian stepon kiel la ĝardeno de la Eternulo; ĝojo kaj gajeco troviĝos en ĝi, dankado kaj laŭta kantado.

4 Atentu Min, ho Mia popolo, kaj vi, Mia gento, aŭskultu Min; ĉar instruo eliros el Mi, kaj Mian leĝon Mi starigos kiel lumon por la popoloj.

Jesaja 51:1-4

Tre realisme, ŝajnas al mi.

Tiaj ofte ni homoj ja estas: malmolaj, duraj, neflekseblaj, ne emas cedi al aliaj, ne emas lasi spacon liberan al aliaj – ni, el roko hakitaj.

Sed kiaj ajn ni estu: ni ja aŭskultu Dion, ni ja serĉu lin kaj liajn padojn por iri tra la vivo.

La profeto montras, ke siatempe la tuta biblia historio komenciĝis tre malgrand-amplekse: nur unu viro, nur unu virino – kaj ho kiom multiĝis la

afero. – Eta komenco ne implicas malsukceson, male: en la Biblio ofte estas emfazate ke el io malgranda kreskas io granda kaj multpromesa.

En la evangelio de Johano ni legis pri la puto de Siĥar, kien venis Jesuo kun siaj lernantoj. Portempe tiuj laste menciitaj foriris, Jesuo postrestis sola. Samariana virino surscenejiĝas, ekparolas kun Jesuo. Ŝin dekomence montras al ni la fakto, ke ŝi – male ol kutime faris la virinoj – iras por preni akvon el la puto ne je kutima taŭga momento sed ĝuste, kiam la suno estas plej varma – do ŝi eviti volas la ceterajn virinojn, por ke tiuj pri ŝi ne klaĉu. Ni estas do avertitaj. Kaj ja montriĝas poste, ke ŝi jam havis plurajn edzojn kaj “kiun nun vi havas ne estas la via“ – ŝi do –kiel nuntempaj pruduloj dirus „vivas en pekoj“.

Sed por Jesuo tiu fakto ŝajne en si

mem signifas nenion – li simple aliras al ŝi kaj al ŝiaj demandoj tute rekte neŝanceliĝante kaj sen bigoteco aŭ hontokulturaj sentoj. Por Jesuo nur homo ŝi estas – ja Samariana virino, sed fakte nur homo.

en la Biblio ofte estas emfazate ke el io malgranda kreskas io granda kaj multpromesa.

Ŝi demandas pri tiama diskuttemo (aŭ temo de kverelo eble) inter Samarianoj kaj Judoj: kio estas la ĝusta templo, la templo kiun Dio mem intencis – tiu en Jerusalemo aŭ tiu sur la monto Gerizim? – Parenteze: Samarianoj estas religio, kiu ankoraŭ nun plu ekzistas ĉirkaŭ tiu sama praa monto kaj ties sanktejo kaj

Kiam la Sinjoro sciigis, ke la fariseoj aŭdis, ke Jesuo altiras kaj baptas pli da lernantoj ol Johano (2 kvankam ne Jesuo mem baptis, sed liaj lernantoj), 3 li forlasis Judajon kaj denove foriris al Galileo.

4 Necesis ke li pasu tra Samario. 5 Li venis ĉe la Samaria urbo Siĥar, apude al la terpeco, kiun donis Jakob al sia filo Jozef. 6 Estis tie la puto de Jakob. Jesuo, elĉerpita de la vojaĝado, eksidis do ĉe la puto. Estis ĉirkaŭ la sesa. 7 Samaria virino venis ĉerpi akvon. Diris al ŝi Jesuo: Donu al mi trinki. 8 Ĉar liaj lernantoj estis for al la urbo, aĉeti manĝaĵon. 9 La Samaria virino diris al li: Kiel povas vi, estante Judo, peti trinki de mi, Samaria virino? (Judoj ja neniel rilatas kun Samarianoj.) 10 Jesuo reagis: Se vi konus la donacon de Dio, kaj scius kiu estas, kiu diris al vi: Donu al mi trinki, tiam vi petus lin, kaj li donus al vi vivan akvon. 11 Ŝi diris al li: Sinjoro, vi ne havas sitelon kaj la puto profundas: de kie vi do prenis tiun vivan akvon? 12 Aŭ ĉu vi pli grandus ol nia patro Jakob? Tiu ja donis al ni la puton, kaj mem trinkis el ĝi kun siaj filoj kaj siaj gregoj.

Johano 4:1-12

laŭ la traduko de Gerrit Berveling, *LA BONA MESAĜO DE JESUO*

la tiea ĉefpastro ktp – same kiel ankaŭ Judismo kompreneble plu ekzistas. Ni homoj, en niaj provincecaj rigardmanieroj ofte emas misrigardi la realon, nur vidante nian propran mondon, forgesante ke la mondo estas plurrilate multege pli bunta kaj riĉa kaj sekve do pli inda je Dio mem, kiu estas ja plej

bible ni eble nur diru, ke Dio videblas en la homo kiun ni renkontas nia-viv-voje

bunta Patro-Patrina de ĉiu ekzistanta. Foje ni emas legi la Bibliion kvazaŭ temus nur pri nia propra rondeto, aŭ nia eklezio. Sed la mondo estas pli granda.

Jesuo do prenas ŝian demandon tute serioze: li ne reagis kiel multaj tiutempe estus reagintaj: „ho virino, silentu do – pri religiaj teologiaj temoj diskutu ja nur

viroj“ – male: Jesuo prenas ŝin serioze, kaj diras: Nek Nek – Dio estas la Spirito, Dio ne loĝas en homfaritaĵo – Dion oni adoru nek specife nur en Jerusalemo nek specife nur sur la Gerizim-monto – Dion oni estonte adoru en la Spirito.

Kion por ni nun ni povas legi en tio? Eble minimume, ke niaj eklezioj ne estas la nuraj gravaĵoj en religio: Dio ne ligiĝas al nur unu homfaritaĵo, ĉu templo, ĉu katedralo, ĉu instituto aŭ kio ajn: bible ni eble nur diru, ke Dio videblas en la homo kiun ni renkontas nia-viv-voje: la homo, farita laŭ bildo de Dio. Eble ni fariĝu iom modestaj, moderaj: Dio estas Spirito – kaj spirito baze estas nekaptebla: Dio iras sian vojon al ĉiu homo, kaj tio neniel dependas nur de ni homoj.

Ni serĉu Dion, kiel ankaŭ jam diris la profeto. Ni serĉu lian padon tra la vivo.



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

23. junio

Sankta Patro, benu min por ke mi estu beno por aliaj. Torentoj de vivanta akvo eliru el mi. Mi portu al la homoj en malfacilaj cirkonstancoj veran ĝojon. Mi estu kiel fonto, kiu refreŝigas la soifantan vojaĝanton.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (vidu adreson en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



La Eternulo, nia provizanto

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Abraham oferis Isaakon

En Genezo, la ĉapitro 22, estas rakonto pri la provo kiun Dio faris al Abraham. Li ordonis ke Abraham oferu sian filon Isaakon kiel bruloferon. Abraham senprokraste obeis kvankam Dio estis promesante ke la idaro de Abraham estus per Isaak. Abraham konstruis la altaron, surmetis la lignon, ligis Isaakon kaj metis lin super la lignon. Sed kiam Abraham prenis la tranĉilon kaj etendis sian manon por buĉi Isaakon, la anĝelo de la Eternulo ekvokis lin kaj diris: “ne etendu vian manon sur la knabon kaj faru al li nenion; ĉar nun Mi scias ke vi timas Dion kaj vi ne indulgis pro Mi vian filon,” (versiklo 12). Sekve, Dio konfirmis Sian pakton kun Abraham. Tiam Abraham vidis virŝafon implikitan per la kornoj en la arbetoj, kaj li oferis ĝin kiel bruloferon anstataŭ sia filo. Tial Abraham donis al tiu loko la nomon “la Eternulo provizos.”

Malfacila decido

Multaj jarcentoj poste, mia familio kaj mi ankaŭ ekkonis Dion kiel “la Eternulo, Nia Provizanto”. Estis la jaro 1975, tempo tre malfacila kaj tre malĝoja ĉe ni. Tiu jaro, pro malfeliĉaj cirkonstancoj nia preĝejnaro en Porto Riko kaj ni estis devigitaj forlasi la eklezion en kiu mia edzino Mildred kaj mi naskiĝis, la eklezion en kiu niaj patroj estis pastroj.

Per nia agado, ni perdis la salajron

de la misio, la uzadon de la misia aŭto kaj la medicinan asekuron provizitan de la misio. Ni ricevis salajron de la preĝejnaro sed ni nur havis malnovan aŭton kiu ne povis foriri el la urbo kaj ni ankaŭ ne havis medicinan asekuron. Estis tempo en Porto Riko kiam okazis multaj krimoj. Mia familio kaj mi estis tre vundeblaj. Do, mi preĝadis: “Dio gardu nin kontraŭ krimo kaj kontraŭ serioza malsano”.

Se vi moviĝas, mi mortigos vin!

La 4-an de julio en 1975, je la dua kaj kvarono matene, du krimuloj eniris en nian hejmon. Ili supreniris al la dua etaĝo de la domo. Dio metis min en profundan dormon. Ili eniris en la ĉambron de Mildred kaj mi kaj en la ĉambron de la filo William. Poste unu el la krimuloj restis en la koridoro dum la alia krimulo eniris en la ĉambron de Ester, knabino de preskaŭ dek kvar jaroj. Li vekis ŝin kun tranĉilo kontraŭ la gorgo kaj li diris: “Se vi moviĝas, mi mortigos vin”. La krimulo deziris seksatenci ŝin en ŝia propra lito! Antaŭ ol li faris tion, li ekrigardis sian kamaradon en la koridoro. Je la sama momento, Ester ekkriegis: “Paĉjo! Paĉjo!” (Mi rememoros tiun kriegon ĝis la tago de mia morto) Mi vekigis kaj mi eksciis ke Ester estis en morta danĝero. Mi forte ekkriegis kaj la krimuloj forkuris.

Kvankam la krimulo ne povis seks-

atenci Esteron, la timego, kiun ŝi suferis, kaŭzis ke aperu, je malmultaj tagoj poste, seriozan problemon de ŝia tirojdo. Mi estis preĝanta: “Dio, gardu nin kontraŭ krimo kaj kontraŭ serioza malsano”. Spite mia preĝado, la du katastrofoj okazis. Kial? Ĉu Dio ne aŭdis min? Jes, certe Li aŭdis min. Sed Li deziris montri sin kaj al mia familio kaj al mi, kiel la Eternulo, nia Provizanto.

Ester malsanegas

Pro la grava problemo de ŝia tirojdo, ni devis porti Esteron al kristana malsanulejo meze de Porto Riko por ke ŝi ricevu la plej bonan kuracadon. Tiu malsanulejo estis inter la montoj, je horo kaj duono for de nia hejmo sur la marbordo. Kiel mi jam menciis, nia aŭto estis malnova kaj ĝi preskaŭ ne povis eliri el la urbo.

Tiam Dio komencis montri sin kiel nia Provizanto, same kiel Li faris por Abraham. La tagon antaŭ ol ni komencis vojaĝi tage al tiu malsanulejo, juna viro el nia preĝejnaro alvenis al nia hejmo kaj diris: “Pastro, mi devas reiri al mia lando Kanado. Mi deziras lasi mian aŭton ĉe vi. Vi devas fari la pagojn. Se mi ne revenos al Porto Riko, la aŭto estos via nur per tiuj pagoj. (Li ŝuldis nur 1.000 dolarojn, eble la duono de ĝia valoro). La aŭto estis Toyota de la jaro 1973 (du jarojn de uzo). Ek de tiam, ni nomis la aŭton, “la aŭto de Ester”. Ĝuste en tempo, Dio provizis tre bonan aŭton por fari multajn vojaĝojn al tiu malsanulejo, tie inter la montoj.

La ultimato

Tiam okazis alia problemo. Ester ne bone reagis al la medikamentoj kiujn ŝi ricevis. Post kelkaj semajnoj, la kuracisto diris ke eble operacio estus necesa. Dum tiu tempo, alvenis letero kun ĉeko de mil dolaroj. Mildred kaj mi diris unu al la alia: “Ĉi tiu mono estas por la operacio de Ester.”

La 11-an de septembro, la naskiĝtago de Ester, ni iris al la malsanulejo. Ni pensis ke la kuracisto donus al ni daton por la operacio de Ester. Anstataŭ tio, la kuracisto diris: “La tirojdo de Ester estas tute neregebla. Estus la kosto de ŝia vivo meti ŝin sur la tablo de operacioj. Vi devas transporti ŝin al malsanulejo en Usono kie ŝi povos ricevi nuklean kuracadon. Ŝi devas esti jam lunde en malsanulejo .” (Estis jaŭdo nokte.)

Kie estas la Dio de Elija?

Dum la vojaĝo hejmen, Mildred preĝis: “Kie estas la Dio de Elija?” Tiel preĝis la profeto Eliŝa por ke Dio dividu la riveron Jordan post kiam la profeto Eliaja vivante estis transloĝita al ĉielo. (2 Reĝoj, ĉapitro 2) Alveninte hejmen, Mildred komencis paki la valizojn, sed ŝi ne sciis kien ŝi kaj Ester iros. Mildred daŭre preĝis: “Kie estas la Dio de Elija?”

Ni telefonis al kelkaj amikoj kaj parencoj en Usono. Je malpli ol 24 horoj, kvin malsanulejoj malfermis siajn pordojn al Ester, ofertante al ŝi senpagan kuracadon. Estis problemo decidi kien transporti Esteron. Malsanulejo en la urbeĝo Filadelfio en la ŝtato Pennsylvania estis la unua kiu malfermis la

pordojn al ni. Kuracisto tie instruis specialistojn pri problemoj de la tirojdo. (Li estis pli ol specialisto, li instruis la specialistojn!) Tiu kuracisto akceptis ĉiu-jare kvar/kvin malsanulojn por ricevi senpagan kuracadon. Pro flegistino, parenco de familio el nia preĝejanaro, li bonvole akceptis Esteron. Do, ni decidis transporti ŝin tien.

Dio provizas loĝadon kaj kuracadon Sed kie Mildred povus loĝi dum sia restado en Filadelfio? Wilma Evans, nigra amikino de nia familio, loĝis en tiu urbego. Ni ekkonis Wilma-n kelkajn jarojn antaŭe, kiam ŝi pasigis tempon en Porto Riko. Wilma estis tre sperta instruistino. Mildred telefonis ŝin. Post klarigo pri la problemo, Mildred diris: “Mi alvenos al Filadelfio sabaton nokte. Ĉu mi povos resti kun vi ĉi-tiun semajnfino, ĝis mi trovos gastejon lunde?” Wilma respondis: “Vi povos resti kun mi la tutan tempon kiun vi bezonos.” Mildred diris: Sed tio povos esti kelkaj semajnoj.” “Ne gravas,” respondis Wilma. “Miaj filoj ne estas hejme. Mi estas ĉi tie sola kun mia patrino. Venu.” Tiam ŝi diris: “Kaj, kion vi faros kun William?” Mildred diris: “Li restos kun sia patro.” (Reale, ni maltrankviliĝis pri

William. Li estis etulo kaj li eble estos longtempe sen sia patrino) Wilma respondis: “Ne faru tion. Venigu lin ankaŭ. Li povos akompani min al la lernejo ĉiu-tage.”

Tiel, Dio provizis la kuracadon por Ester kaj lokon por Mildred kaj William. Li jam sendis al ni la monon por la aeraj biletoj. Sabate nokte, mi adiaŭs la tutan familion en la flughaveno. Tri horojn poste, Wilma renkontis ilin en la flughaveno de Filadelfio. La kuracisto en Porto Riko donis al ni “ultimaton” ke Ester devos esti jam en usona malsanulejo lunde. Li bone sciis kion li diris. Lunde matene kiam estis tempo por transporti Esteron al kuracisto, ŝi estis tre, tre malsana; ŝi ne povis piediri.

Ĉio tio estas neordinara

Wilma kaj Mildred portis ŝin inter la brakoj kaj metis ŝin en la aŭton. Antaŭ ol la familio eliris el Porto Riko, la kuracistoj, en la malsanulejo tie, diris al ni: “Estas multaj aferoj pri la tirojdo kiujn neniu scias. Ekzistas multaj proceduroj por kuraci problemojn de la tirojdo. Do, vi devas kompreni ke la kuracisto, tie en Filadelfio verŝajne ripetos ĉion, kion ni faris.” (Estis pro tiu kialo ke la restado de Ester en la



malsanulejo povus daŭri kelkajn semajnojn). Tie en la oficejo en Filadelfio, la kuracisto zorge legis la raporton kiun Mildred alportis el Porto Riko. Tiam li diris: “Ĉio tio estas neordinara. Ekzistas multaj proceduroj por kuraci problemojn de la tirojdo. Tiuj kuracistoj en Porto Riko uzis la samajn procedurojn kiujn mi uzus. Ni ne bezonas ripeti tion kion tiuj personoj faris. Ni povas daŭri antaŭen.”

Je malpli ol semajno, Ester ricevis la nuklean kuracadon. Ŝi resaniĝis kaj eliris piedirante el la malsanulejo. Restis mono ankoraŭ kaj ankaŭ mi flugis al Filadelfio.

Mildred kaj mi vojaĝis 2.500 kilometrojn per aŭtobuso por viziti niajn gepatrojn en la ŝtatoj Kansas kaj Oklahoma. Ester kaj William restis kun Wilma.

La reveno al Porto Riko

Poste, kiam ni reiris al Filadelfio, ni forflugis al Porto Riko. La usona kuracisto diris al ni ke Ester devus ricevi medikamenton por la tirojdo dum la tuta vivo. Tial ni monate veturis per la “aŭto de Ester” al la malsanulejo inter la montoj. Baldaŭ, Mildred rimarkis ke la medikamento malsanigis Esteron. Ŝi menciis tion al kuracisto. Li diris: “Se la medikamento malsanigas Esteron, vi ne devas doni ĝin al ŝi. Revenu ĉi tien la 24-an de decembro ĉar tiu tago malpli malsanuloj estos en la oficejo.” Ni ĉesis doni la medikamenton al Ester kaj ŝi tuj resaniĝis.

Sed Mildred koleris kontraŭ la kuracisto: “Kial li ordonis ke ni reiru al la

malsanulejo la 24-an de decembro? Eble ĉeestos malmultaj malsanuloj tiun tagon sed por ni la vespero de Kristnasko estas tempo tre okupita!” Spite al ŝiaj protestoj, ni reiris al la malsanulejo la 24-an de decembro. La kuracisto zorge ekzamenis Esteron. Tiam li diris al ni: “Ester estas tute resaniĝita. Mi ne bezonas revidi ŝin ĝis du jaroj plu.” Ni ĝoje komencis la vojaĝon hejmen. Subite Mildred komencis plori. Mi demandis: “Kio estas kun vi?” Ŝi respondis: “Mi tre hontas. Mi koleris kontraŭ la kuracisto. Dio ĉi-momente parolas al mi: ‘Ĉu vi komprenas kial Mi deziris ke vi reiru al la malsanulejo hodiaŭ? Nuntempe vi festas la naskiĝtagon de Mia Filo kaj mi havis specialan donacon por vi: la novaĵo ke Ester estas tute resaniĝita!’ Ho! Mi tre hontas!”

Ek de tiam Ester kreskis normale. Ŝi ne plu bezonis medikamenton ĝis ŝi havis pli ol 30 jarojn, kiam ŝi prepariĝis vojaĝi al Malajzio por tie servi kiel instruistino en misiista elementa lernejo. Pro la premo de tio, ŝi bezonis preni malgrandan dozon ĉiutage. Ŝi nun havas 54 jarojn kaj dum ĉiuj ĉi jaroj ŝi havas bonan sanon.

Ni tre, tre dankas Dion. Miloj da jaroj post la vivo de Abraham, Dio montris ke Li estas nia Provizanto, kaj Li daŭre estas nia Provizanto.

Glorata estu Lia Nomo!

Sekcio de kristanaj esperantistoj de ĈEA sincere invitas Vin
partopreni la **KRISTANAN KONGRESON**
(66-an kongreson de KELI)
16. - 23. 7. 2016, BRATISLAVA, Slovakio

A L I Ĝ I L O

Familia nomo: Persona nomo:.....

Adreso: Lando:

Telefono:..... Retadreso:.....

Mi mendas ĉambron: en studenta hejmo: unu-litan du-litan tri - litan

Mi preferas loĝi kun:.....

Dato:.....

subskribo

— Plenigu la dorsan flankon kaj fortranĉu !



Sendu al: Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
Tel: +420 723 672 335 E-mail: polnickypavel@seznam.cz

La kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion en moderna teologia fakultato. Bratislava estas ĉefurbo de Slovakio. Ĝi estas bone atingebla aviadile, trajne kaj aŭte (parkejo en la kongresejo). En la studenta hejmo estas ĉambroj 1, 2 kaj 3-litaj, ĉiuj kun necesejo kaj duŝo.

Sumoj estas en EUROj	La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo			Restadkosto
	ĝis 31.12.2015	ĝis 31. 3. 2016	post 1. 4. 2016	
Kategorio A :	10	20	30	190
Kategorio B :	30	40	50	320 (380)*
Kategorio A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko				* unulita ĉambro
Kategorio B: ĉiuj aliaj landoj				

- Sendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
- Se eblas, uzu UEA-postĝirkonton aŭ pagu prefere al **ING BANK** en Nederlando al **Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam** por konto **kelk-p de KELI**
BIC: INGBNL2A **IBAN:** NL 72 INGB 0000 3789 64

Organizaj informoj:

Mi estas vegetarano: JES / NE

Mi postulas (specialajn dezirojn) :

.....

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn : JES / NE

Mi povus prelegi pri :

.....

Mi alveturos : trajne / buse / aŭtomobile

kiam (proksimume):.....

Notoj de LKK:

El provizora programo:

- oficiala malfermo de la kongreso
- interkona vespero
- diservo kun sankta manĝo
- trarigardo de Bratislava
- prelegoj, kantado
- koncertoj
- jarkunveno de KELI
- tuttaga busa ekskurso al Modra kaj Trnava
- duontaga ekskurso per danuba ŝipo al Děvín

– Trnava –

(Bazita sur Vikipedio)

La KELI-kongresanoj 2016 vizitos Trnava dum la tuttaga ekskurso. Ĝis Traktato de Trianon en 1920, la urbo apartenis al Hungara reĝlando, poste al Ĉeĥoslovakio, fine al Slovakio.

Trnava estas distrikta urbo en okcidenta Slovakio enhavanta ĉirkaŭ 75 mil da enloĝantoj. La ĉefurbo Bratislavo troviĝas nur 40 km sudokcidenten.

Bela la 4-a nomumis la komunumon libera reĝa urbo. La husanoj dum mallonga tempo okupis la urbon en 1432. Inter 1543-1822, pro la turkoj, la episkopo de Esztergom translokiĝis tien. En 1621 armeo de Transilvanio venkis la Habsburgojn.



Urboturo de Trnava



Strato de M. S. Trnavský

Universitato, presejo kaj biblioteko fondiĝis en 1635, sekve la urbo tiutempe iĝis centro de hungara kulturo.

Fine de la 19-a jarcento konstruiĝis granda rondirado de fervojo, kiu ligis plurajn nuntempajn hungarajn kaj slovakajn urbojn kun Budapeŝto.

Ekde 1978 la urbo estas ĉefepiskopejo de slovakaj eklezio. En 1997 oni fondis universitaton pri Sankta Cirilo kaj Sankta Metodo.

☪

Listo de aliĝintoj al 66-a KELI kongreso Bratislava, Slovakio, 16. – 23. 7. 2016

- | | | | |
|----------------------------|---------|-----------------------|---------|
| 1. Farkas Antal, | Rumanio | 7. Laslo Maria, | Rumanio |
| 2. Stamm Sieglinde, | Aŭstrio | 8. Olah M. Judita, | Rumanio |
| 3. Popoviciu E. Ecaterina, | Rumanio | 9. Scurt T. Ildiko, | Rumanio |
| 4. Ojasild Endel, | Estonio | 10. Cousson Philippe, | Francio |
| 5. Fischer O. Arnošt, | Ĉeĥio | 11. Birta Szabolcs, | Rumanio |
| 6. Stier Gabriella, | Rumanio | 12. Polnicky Pavel, | Ĉeĥio |

Renkontiĝo en Jerusalemo

Kun Josef J. KOHEN-CEDEK

Intervjuis Leen HORDIJK, NL

Leen Hordijk estis kasisto de KELI dum pluraj jaroj. En la jena artikolo li redonas intervjuon kiun li faris kun Josef Kohen-Cedek en 1990. Mi ricevis la intervjuon kopie kiam li sendis ĝin al amiko en Afriko. Iam la intervjuo estis publikigita en Dia Regno, sed jam pasis multaj jaroj kaj denove valoras legi ĝin. /redaktoro

Kara Mramba Simba, post nelonge mi havos 89 jarojn. Tial mi deziras rakonti al vi historion, kiun mi aŭdis en Jerusalemo de maljuna juda esperantisto en la jaro 1990. Tiu historio rakontas ion pri la kreinto de Esperanto. Tiu persono, Josef Kohen-Cedek, naskiĝis en la jaro 1904, kaj mem renkontis L. L. Zamenhof en 1916. Aŭdu mian kaj lian historion.

Dum pilgrimado en la lando de Biblio, mi volis renkonti iun esperantiston. Tial mi skribis poŝtkarton al prof J. Kohen-Cedek, delegito en Jerusalemo. Lia tuja respondo kuraĝigis min viziti lin en lia domo. Feliĉe lia domo troviĝis en la relativa apudeco de mia hotelo. Estis malvarme, nur 8 °C kaj matene eĉ neĝis tiun 1-an de aprilo, kiam mi alvenis al lia hejmo. Lia edzino malfermis



Josef Kohen-Cedek

KOHEN-CEDEK, Josef J. 1904-1991. Ruslanda hebreo, poste israelano; gimnazia instruisto. Naskiĝis en Vilno. Eklernis Esperanton en 1916. Vivis en Palestino de 1925. Aktivis en la palestina, poste israela, Esperanto-movado kaj redaktis ties bultenojn. Konis la lingvojn rusan, jidan, polan, germanan, hebrean, ukrainan, kaj malpli perfekte la lingvojn armenan, grekan, latinan, litovan, anglan kaj francan. Vicprezidanto de E-Ligo Izraelanda. Artikoloj kaj poemoj en "Heroldo", "Malgranda revuo", "Fonto" k.a. gazetoj. Verkis hebrean Esperanto-lernilon. Tradukis el la hebrea.

/William Auld en Esperanta Antologio, 1984.

Verkoj: Hebrea kantareto (tradukitaj kantoj, 1941)
Tiberio (poemoj, 1942)
Kosma amo (poemaro, 1986)

la pordon kaj alvokis la profesoron. Sidante en la studĉambro kaj trinkante tason da kafo, mi aŭdis lian rakonton pri lia longa vivo.

Mi naskiĝis en la jaro 1904. Miaj gepatroj loĝis en Vilno, Litovio. Ili estis judoj kaj antaŭ ol mi havis dektri jarojn, kiam oni fariĝas “bar-micva” (filo de leĝo, io simila al konfirmacio), la patro deziris ke mi lernu religiajn temojn, kvankam mi ŝatus pli la sportojn. Finfine mi estus kunlaboranto en la komercista entrepreno de la patro.

Iam mi akompanis la patron en la jaro 1916, vojaĝinte al Varsovio. En la stacidomo en la okulon de la patro subite enfalis fajrero de la lokomotivo. Oni rekomendis nin iri al la fama okulkuracisto Zamenhof. Alveninte al lilia akceptejo ni ĝin trovis plenplena. Dum la longtempa atendo mi tralegis kelkajn legaĵojn kiel 'la Novan Judan Gazeton' kaj la tie trovitan libreton 'Fundamento de Esperanto' de D-ro L.L. Zamenhof. Kiam finfine mia patro eniris la konsultejon, mi ankaŭ eniris kun la intenco demandi la doktoron pri lia kreita lingvo. La patro montris sian okulon al la kuracisto, kiu tralavis ĝin, dirante ke la doloro certe forpasos post kelkaj horoj sen malbonaj sekvoj.

Mi memoras ke Zamenhof havis blanka-ruĝetan barbon. Paginta la honoraron, je sumo de 5 rubloj la kuracisto konsentis akcepti nur 3. Tiam mi demandis al D-ro Zamenhof pri lia lingvo. Mia patro kaj Zamenhof parolis jide, laŭ la t.n. “litova dialekto”, ĉar ambaŭ naskiĝis en Litovio. “*Kiabaze vi elektis la vortojn, sinjoro D-ro?*” mi komencis. Li respondis “*Diru al mi, knabo, kiujn*

vortojn havas la angla, franca, germana, pola, lingvoj por la rusa vorto 'vino'?” Mi respondis “*Tio estas: wine, vin, Wein, vinó*”. “*Pro tio mi elektis la radikon 'vin'.* *Sammaniere mi elektis la aliajn*”. Do laŭ la pleja ofteco en diversaj lingvoj konjektis mi. “*Kial vi fiksas la deklinaĵojn?*” mi redemandis. “*Kiom da deklinaĵajn kazojn havas la pola, la rusa, la germana, la angla?*”, kaj mi respondis: “*la pola 7, la rusa 6, la germana 4, la angla 1*”. “*Ĉu vi supozas ke tial la rusa havas malpli da esprim-povo ol la pola? Tute ne! Por Esperanto mi bezonas nur 2*”. “*Kaj kiel vi pritraktis la konjugaciojn de la verboj?*” mi demandis. “*Cu vi scias la prezencon de la hebrea verbo iri?*”. “*Jes, ĝi ne varias je la diversaj pronomoj*”. “*Nun surbaze de tio mi faris la samon ankaŭ al la Esperantaj konjugacioj de la aliaj tempoj*”.

Finfine li etendis la manon al mi kaj promesigis min, ke mi lernos Esperanton. Ĉar mi tiam estis en la 8- klaso mi prokrastis plenumi la promeson kaj poste mi forgesis ĝin.

Kelkajn jarojn poste, t.e. la 11-a lernojarlo, forironte al nia somerbieno, mia patrino malavare donacis monon al mi por aĉeti legaĵojn. Mi iris al la vendejo de uzitaj libroj, serĉante kelkajn romanojn kaj krimrakontojn. Inter ceteraj libroj mi trovis la libron “Fundamento de Esperanto”. Krom aliaj libroj mi aĉetis ankaŭ ĝin. Tamen mi ne legis la romanojn sed studis Esperantan libron, ne ĉar mi memoris mian promeson al D-ro Zamenhof sed ĉar la lingvo enkaptis min — ĝi tre plaĉis al mi.

Post du monatoj mi sciis la lingvon kaj konis parkere versaĵojn de pastro A. Dambraŭskas. Elpreninte el la libro-ŝranko libron prof. Kohen-Cedek montris al mi la rusa-eperantan vortaron, de eldonjaro 1910. “Tion mi aĉetis tuj kiam mi esperantiĝis”.

Mi deziris aliĝi al Esperanto-grupo de prof Baŭdoin de Courtenay, kvankam li estis liberala homo, nur poloj rajtis aparteni al tiu klubo, sed ne judoj. Pretekste li demandis min, kiom da jaroj mi havas. “Mi ne akceptas junajn knabojn” estis la respondo. Poste mi turnis min al judaj kluboj, sed tiuj nur konsistis el socialistoj kaj komunistoj. Tial mi restis ekster la movado, kontaktis kun aliaj esperantistaj judoj. Nia patro diris al mi: “Lasu tiun stultaĵon!” En 1933 mi aliĝis al UEA.

En 1924 mi almigris Palestinon pro la antisemitismaj pogromoj. Tio faris min cionisto. Kiel pioniro mi laboris kiel ano de kibuco “Hakovash” [Konkeranto]. Mi sekigis la marĉojn apud Haifa, sed kiam mi malsaniĝis je malario mi devis forlasi la kibucon. “Laboru laŭ via antaŭa metio” oni diris. Mi fariĝis instruisto en la “Vilaĝo de Junularo” en

la valo de Jizreel. Tie loĝis la orfoj de la ukrainaj pogromoj. Mi devis multon lerni por poste instrui la agrikulturon al la gejunuloj de la orf-vilaĝo. Mi ege ĝojis ke mi migris al Palestino, ĉar ĉiutage mi vidis la lokojn kaj pejzaĝon de la Biblio, fronte al mi la montarojn de Gilboa kaj Karmelo, la fonton de Gideono k.t.p. Poste mi partoprenis en la rezista movado kontraŭ la “mandateno” de Angloj. Sed tio estas alia historio pri kiu mi eble parolos poste. Ankaŭ pri mia muzika agado mi ne rakontas.

Mi instruis Esperanton al multaj homoj, uzante propran sistemon de manipulado pere de internaciaj vortoj. La lastajn jarojn mi verkis Hebrean Antologion, kiu eldoniĝis en 1988. Bedaŭrinde oni ne recenzis ĝin kvankam la eldonejo ELI sendis ekzemplerojn al UEA.

En mia longa vivo mi travivis multon, sed dank' al la helpo de mia edzino mi povis labori multe por Esperanto kaj je la bono de mia lando.

Jerusalemo, la 1-an de aprilo 1990.

☞

Tiu kiu volas lerni iom pli pri la historia evoluo en kiu J Kohen-Cedek

libera folio
SENDEPENDA MOVADA BULTENO

ludis gravan rolon, trovas en Libera Folio (25 junio 2006) longan artikolon, bazita sur “ampleksa kaj bone dokumentita artikolo” de Doron Modan, en kiu li “rakontas pri la mirinda historio de araboj kaj judoj, kiuj ‘pionire, naive kaj pacreve praktikis la esencon de Esperanto’.”

La artikolo estas titolita *Araba-juda lingvo de paco: vera historio*. Ĝi troviĝas ĉe <http://www.liberafolio.org/2006/arabajuda>.

Nekonata historio pri Nagasaki

Kaj Maksimiliano Kolbe

el 'Nova Urbo' kun afabla permeso

En jaro 1931, al Nagasaki veturis surŝipe Maksimiliano Kolbe kun kelkaj franciskanoj. Japanoj akceptis bonvole la gastojn kaj la episkopo indikis al ili lokon por konstrui la monaĥejon – sur la neloĝita deklivo de

Internacia novaĵletero
de Fokolar-Movado



Hikosan-monto.

De ĉi tiu momento komenciĝas la nekutimaj eventoj. Kiam ili tien iris por ekvidi la donacitan lokon, la monto aspektis tre malkonvena por loĝi kaj des pli por konstrui ion ajn. La deklivo, surkreskita per sovaĝaj arbustoj, estis tute ne mastrumita kaj malfacile alirebla. La kunfratoj volis konvinki Maksimilianon ke oni trovu alian lokon, prefere en Urakami kie vivas 15 mil kristanoj. Maksimiliano respondis, ke “obeemo alportas bonajn fruktojn, do ni ekloĝu sur la monto Hikosan”. Li tamen ne volis neglekti la amikajn sugestojn kaj kuniris por vidi la kvartalon de Urakami. Kaj nun ni citas (eble ŝokan por multaj) ateston pri tiu vizito.

Alveninte al Urakami, p. Maksimiliano ekvidis tiun lokon bela, sed diris: “ni ne povas konstrui monaĥejon ĉiloke,

ĉar post nelonge falos ĉi tie fajra globo kiu ĉion detruos”.

La esprimo “fajra globo” aŭdiĝis tiam infanece fantazia, ja en jaro 1931 neniu eĉ imagis ke homoj konstruos atombombon. Fision (la proceso de nuklea fendigo) oni komencis esplori nur ok jarojn poste. Tial p. Kolbe, se havis vizion pri atoma atako je Nagasaki, ne povis uzi la nekonatan tiam vorton “atombombo” – parolis do nur pri “fajra globo”.

En aŭgusto 1945 fakte aperis la fajra globo de 4500-kilograma atombombo kiu mortigis 10 mil homojn dum apenaŭ kelkaj sekundoj. La cetera plimulto mortis poste en suferoj pro la post-eksploda atom-radiado. Kie staris la urbo, restis nur amaso da ruboj.

Kaj kio okazis en la monaĥejo



konstruita sur la “maltaŭga” monto-flanko? Hikosan ŝirmis ĝin kontraŭ la fajra blovego, nur vitroj rompiĝis en kelkaj fenestroj. Tiam oni rememoris la averton de p. Maksimiliano kaj post la milito aranĝis tie muzeon. Unua ĉambro, en kiu ekloĝis p. Maksimiliano. Nuntempe ĝi estas parto de la muzeo en Nagasaki.

Maksimiliano Kolbe ne ĝisvivis al tiu jaro, li revenis al Eŭropo en 1936 kaj komence de la 2a mondmilito estis arestita de Gestapo (sekreta polico de

Germanio). Aŭguste 1941, la germana gardisto murdis lin en Auschwitz-koncentrejo.

Post 30 jaroj Maksimiliano Kolbe estis proklamita martiro kaj patrono por malfacilaj tempoj. En siaj leteroj p. Maksimiliano favore sin esprimis pri Esperanto kaj bondeziris ke nia Internacia Lingvo disvastiĝu. Unu el liaj periodaĵoj aperis i.a. en Esperanto. Pro tio li estis ankaŭ rekonita kiel patrono de la esperantistoj.

☞

En Vikipedio ni povas inter alie legi:

Sankta Maksimiliano Kolbe (naskiĝinta la 7-an de januaro 1894 en Zduńska Wola, mortinta la 18-an de aŭgusto 1941 en Aŭŝvico) estis pola romkatolika franciskana monaĥo, pastro, teologo kaj misiisto. En februaro de 1941 li estis arestita de Gestapo kaj sendita en koncentrejon, inter alie pro kaŝante judojn. Li pereis en Aŭŝvico, kiam li proponis sian vivon interŝanĝe por la vivo de unu patro de familio, kiu nomiĝis Franciszek Gajowniczek. En 1971 papo Paŭlo la 6-a beatigis lin kaj la 10-an de oktobro 1982 Johano Paŭlo la 2-a proklamis lin kiel martiron. Franciszek Gajowniczek, kiu transvivis Aŭŝvicon, dediĉis sin al disinformado pri Kolbe kaj liaj oferto kaj agado en la koncentrejo. Li ĉestis 1982 kiam la papo sanktigis Kolbe.

En 1906 en preĝejo al Sankta Mateo en Pabianice, laŭ rakonto de Kolbe mem, aperis antaŭ li Sankta Maria, tenanta en siaj manoj du kronojn, la blankan kaj la ruĝan. Ŝi demandis lin kiun li elektas komprenigante ke la ruĝa signifas martirecon kaj la blanka ĉastecon. Li prenis ambaŭ.

En la jaroj 1931–1935 li estis misiisto en Japanio, kie li komencis eldoni japanan revuon *SEIBO NO KISHI* [Kavaliro de Senmakula]. Similajn misiejojn li fondis en Ĉinio kaj Barato. En 1936 li, pro sanigaj kaŭzoj, revenis al Pollando al Niepokalanów (proksime al Sochaczew), kiu iĝis la plej granda katolika monaĥejo en la mondo – septembre 1939 estis tie ĉ. 700 monaĥoj kaj kandidatoj.



Statuo de Kolbe (maldekstre) super la granda okcidenta pordo de Abatejo Westminster, UK

☞

Ekumenaj BIBLIAJ TAGOJ 2016 kun ADORU

Estimataj, mi invitas vin partopreni la Bibliajn Tagojn okazantajn de la 6-a ĝis la 10-a de aprilo 2016, de merkredo (18:00 h.) ĝis dimanĉo (13:00 h.) en la dua semajno post Pasko.

Kie? En la nord-okcidenta rumana urbo **Baia Mare** (aliaj malnovaj nomoj: Frauenbach, Groß-Neustadt, Nagybanya). Ĝi havas ĉirkaŭ 120 mil enloĝantojn kaj interesan historion kaj nuntempon, ankaŭ koncerne al kristanaj konfesioj. (Se vi deziras, trovu sub Wikipedia en interreto bildojn pri Baia Mare)

Kial? Kvankam iom malproksime por multaj (sed najbare ekz. por hungaroj, slovakoj kaj kompreneble rumanoj!), la urbo kaj lando havas plurajn avantaĝojn, por Bibliaj Tagoj:

- Post la fino de la socialisma diktaturo, kaj aliĝo al la Eŭropa Unio, ankoraŭ nun la lando estas iom nekonata en Okcidento (estas antaŭjuĝoj por supervenki!)
- La nivelo de PREZOJ estas ankoraŭ malalta, almenaŭ laŭ okcidenta kutimo.
- Tamen, la elektitaj hotelo Roxana Imperial kaj ĝia restoracio estas bonaj kaj altkvalitaj! Guglumu aŭ kontaktu: *office@roxanaimperial.ro* . Estas proksime de la paroĥa domo, en kiu okazos la plej multaj programeroj de Bibliaj Tagoj.
- Ankaŭ laŭ EKUMENA vidpunkto, Baia Mare kaj Rumanio estas interesaj: La unuan fojon, Bibliaj Tagoj okazos en lando kun ortodoksa plimulto! Tamen, en Baia Mare estas ankaŭ multaj protestantoj, kaj katolikoj (rom- kaj grek-katolikoj).

Oni povas vojaĝi al Baia Mare, krom: a) per aŭto, ankaŭ b) per eŭropaj liniaj busoj (el Budapeŝto eĉ ekzistas rekta konekto), kaj c) aviadile, ekzemple al la flughaveno Cluj (Kluĵ), de kie oni povas facile pluvojaĝi per trajno al Baia Mare.

La nepino de Maria Laszlo, kaj bofilino de Teresia Scurt, pretas helpi, profesie tamen senkoste, al ĉiuj, kiuj deziras helpon, proponojn, ideojn pri la vojaĝo, laŭ tio, kio estas por vi plej grava (prezo / komforto / daŭro). Vi povas kontakti ŝin rekte (tamen bedaŭrinde nur anglalingve) per facebook: Iulia Dan Scurt, aŭ nerekte, en Esperanto, per Maria Laszlo: *laszlo_maria@yahoo.com*. Ne hezitu ŝin demandi, ŝi estas helpema kaj afabla.

Kiom kostos? La prezoj multe varias laŭ viaj deziroj:

- Se vi volas loĝi sole en hotelĉambro, kun kompletaj restoraciaj manĝoj (matene, tage, vespere), ĉio kostos 170 €.
- Se vi pretas loĝi plurope en du, tri, aŭ kvinlita ĉambro, la prezo malaltiĝas, ĝis 114 €.
- Se ankoraŭ vi volas rezigni pri iuj el la restoraciaj manĝoj (eblos ankaŭ iom da memzorgado, matene kaj vespere, en la paroĥa domo, demandu Maria-n!),

ankoraŭ la prezo povas malaltiĝi je 40 €, do al minimume 74 €, inkluzivante 4 hotelajn tranoktojn (tamen kvinope), tagmanĝojn, kaj la ekskurson al tradicia ortodoksa monaĥejo Birsana.

Demandojn pri loĝado, prezoj kaj lokaj kondiĉoj, bonvolu rekte turni al Maria Laszlo!

Tiuj, kiuj jam partoprenis la Bibliajn Tagojn, ŝatas la amikecan etoson kaj tiun miksaĵon el spirita, kleriga, Biblia, muzika, turisma kaj distra programeroj. Se vi jam konas Bibliajn Tagojn, ne hezitu veni al Baia Mare! Se ne, venu por ankaŭ samtempe konatiĝi kun tiu eŭropa urbo (kaj lando), kaj kun la libera, malferma, eklezia kunuleco en Esperantujo!

Ĝis revido en Baia Mare!

Vian partoprenon ĝojatendas *Stefan Lepping* stefanlepping@gmx.de



ALIĜILO

Mi venos al Ekumenaj BIBLIAJ TAGOJ kun ADORU en Baia Mare, Rumanio

NOMO:

ADRESO:

LANDO:

RETADRESO:

TELEFONO: (ankaŭ mobila)

KONFESIO:

MI MENDAS:

tranoktojn en - lita ĉambro, (prefere) kun:

matenmanĝojn en hotela restoracio;

tagmanĝojn en hotela restoracio;

vespermanĝojn en hotela restoracio.

Antaŭpagon de 30 € mi sendas, kiel konfirmon de mia aliĝo, al la konto:
DE82 4146 0116 6242 5485 41, BIC GENODEM1SOE, Volksbank Werl, Bibliaj
Tagoj/Stefan Lepping.

Dato: Subskribo:

Informaĵoj

Moluskoj

Nia membro Oldřich Arnošt FISCHER prelegis pri moluskoj por Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno, la 21-an de oktobro 2015. La redakcio ricevis la prelegajn notojn. En la dokumento pri la moluskoj eblas legi inter alie:

- La nomo moluskoj venas el la latina nomo “Mollusca” kiu signifas molaj bestoj.
- Filumo moluskoj (Mollusca) enhavas multe da specioj, pli ol 130 000.
- En naturo de Ĉeĥa Respubliko troviĝas 249 moluskaj specioj.
- La plej grandaj moluskoj mezuras pli ol dek metrojn, la plej malgrandaj moluskoj mezuras nur du milimetrojn.

Monacha cartusiana



Fotis Oldřich Arnošt FISCHER

Ĉu vi volas havi propran ekzempleron de la artikolo, bonvolu kontakti la aŭtoron aŭ la redakcion.

KRISTANAJ FONTOJ

Ne forgesu viziti la KRISTANAJN FONTOJN, la riĉa kaj multenhava retpaĝaro. Vi trovas ĝin ĉe <http://fontoj.net/>



Preskoboldo aŭ erare skribite?

Sur la fronta paĝo de numero 3/2015 troviĝis du eraroj. Unue temis pri malbona kalkulo – Jan Hus estis murdita antaŭ **600** jaroj en jaro 1415. Due temis pri erara verba formo. La dua Mondmilito fin*Ĝ*is antaŭ 70 jaroj.

La redaktoro sole respondecas pri la eraroj. Ne temas pri iu mistika preskoboldo. Mi pardonpetas. /Redaktoro

Laŭde, laŭte kantu ni al Di'

PREISET FROH DEN KÖNIG, LOBT DEN HERRN DER WELT

Laŭ - de, laŭ - te kan - tu ni al — Di'.
Gra - ce, pa - ce Li re - ga - las — nin.

Ser - ve, ver - ve pre - tu — ni por Li.
Flo - re, glo - re ni — a - do - ru Lin.

mf
Gran - da es - tas Li, ma - jes - ta Li - a nom',
Li - a laŭ - do so - nas vas - te tra l' a - er':

kaj de Li plen - es - tas Li - a — sank - ta — dom'.
ton - dras ŝtor - moj, ven - toj, bru - as — mar' - kaj — ter'.

f
Kos - mo, mon - do, ho - mo, best' kaj — flor':

ĉi - o ĝo - ju pri — la — Reĝ' de l' glori.

mf
Ho, ke — nun, en ni - aj — ta - goj, ĉi - e — re - gu — Li,
Ho, ke — nun en ĉi - uj — ko - roj bru - lu — Li - a — flam',

d.c.
kaj ke — in - ter ĉi - uj — ho - moj kres - ku — har - mo - ni'.
kaj fa - ri - ĝu Li - a — vo - lo, ven - ku — pac' kaj am'.

PREISET FROH DEN KÖNIG, LOBT DEN HERRN DER WELT • laŭ: Trumpet Voluntary (Prince of Denmark's March) • originala 4-voĉa M: Jeremiah Clarke (1674 – 1707), ofte atribuita al Henry Purcell (ĉ. 1659 – 1695) • germana T: nekonata verkinto • E kaj propono por unuvoĉa kantado: Albrecht Kronenberger 2015-09-16